OFICIALA ORGANO
DE S.A.T.

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!   LANTI

# Sennaciulo

## 1-a de MAJO 2007




Sennaciulo, majo 2007, n° 5 (1223), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

www.satesperanto.org

# 1-A DE MAJO EN 2007 - en Parizo kaj Togolando




*Festo en Togolando*



*Distribuado de flugfolioj*

## Vivu la laborista solidareco !!!



*Dum la manifestacio*



*Politikaj partioj kaj sindikatoj*

Sennaciulo

*OFICIALA ORGANO DE S.A.T*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris,
tel. +33.1.47.97.87.05,
telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: +33.9.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la labor-horoj funkcias aŭtomata registrilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril Orsingher,Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markov, Vito Markov, Nikolao Gudskov, Gary Mickle kaj Jacques Schram.
Ĉefredaktoro : Cyril Orsingher
Enpaĝigisto: Krešimir Barković
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❐

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567

# Alĥemio

Mi ŝategas la romanojn de Henri Miller. Tiu usona verkisto scias eltiri universalajn scenojn el sia vivo mem kaj priskribi ilin en belegaj paĝoj kiuj eble estas kelkaj el la plej mirindaj de la tutmonda literaturo. «Kial li skribas tion ?», vi certe demandas. Nu, iutage, mi ellitiĝis frumatene kaj unu el miaj unuaj pensoj estis : «Merdo ! Tiu bonapartista favo (Nicolas Sarkozy) estas la nova prezidento de mia lando !» Mi do demandis al mi mem kiel ŝanĝi tiun koton en oron kiel Miller sciis ŝanĝi sian ĉiutagecon en poeziajn paĝojn. Mil solvoj ekzistas, mil rimedoj por lukti ankaŭ. Inter miaj manoj Sennaciulo estas vera spado kapabla distranĉi la fiajn parolojn de homo kiu vivas envolvita per ideoj kiuj strange similas al tiuj, kiuj furoris dum la plej obskuraj jaroj de la 20-a jarcento. Ja, eĉ la nigraj tajdoj obeas al ritmoj kiel la puraj ondoj ! Ĉiu SAT-ano en sia mondparto ankaŭ mobilizas la necesajn fortojn por subteni la aliajn kamaradojn, informiĝi kaj maturigi pensojn kaj konceptojn. Jen pro kio, kiam mi vidas tiun, kiu kondukos la francan politikon, mi vidas komunan malamikon kaj la premsonĝon de ĉiuj ge-SAT-anoj, kaj kiam mi verkas artikolon por nia gazeto, mi, kiel Miller, sed multe pli humile, ĉiutage provas trovi energion por nutri komunan lukton kies celo havas ununuran vizaĝon... REAKCIAN.

Post kelkaj monatoj, du numeroj de Sennaciulo, kaj la SAT-anoj, inter aliaj gravaj aferoj, certe juĝos pri la laboro de la aktuala redakta skipo kaj la estonto de nia gazeto, dum SAT-kongreso kiun mi deziras projektoriĉa. Atendante tiun tagon ni ankoraŭ bezonas vin. Vi tuj legos interesan majan numeron sed mi denove instigas vin partopreni en via gazeto ĝis julio ! Mi estus malhonestulaĉo se mi fogesus paroli pri ĉiuj kunlaboraĵoj kiujn ni ricevis. Mi ne dece povas citi nomojn sed mi estas konvinkita, ke la enhavo de Sennaciulo restas altnivela, ĉar nombraj artikoloj estas aparte rimarkindaj; estis la verkoj de kamaradoj kiuj venas el diversaj malsamaj horizontoj kaj ĉiam skizas nuancoriĉan portreton de nia asocio. Por fini, mi havas personan peton. La kvalito de la kulturpaĝoj restas mia esenca celo kaj mi denove invitas ĉiujn membrojn daŭre kaj pli partopreni en la kulturaj rubrikoj kaj krei novajn ! Pli ĝenerale, ne hezitu kontakti min aŭ alian skipanon. Vi eble ne ricevos respondon sed via opinio ne estos preterlasata.

Cirilo Orsingher




**SAT-Eldonkooperativo eldonas por la Pariza Kongreso.**

Okaze de la pariza kongreso estas planite eldoni libron pri "MORTPUNO, faktoj kaj dokumentoj", kun beletraj tekstoj (Hugo, Tolstoj, Nekrasov), atestoj de mortkondamnitoj (Ravaŝolo, Sako, Mumia Abu Jamal), kaj detalaj faktoj kaj argumentoj pri la temo. La libro kostos 8 eŭrojn por unuopuloj. Por grupoj kaj libroservoj eblas aĉeti 10 ekzemplerojn kontraŭ 50 eŭroj.

Ankaŭ preparataj estas du T-ĉemizoj, "Esperanto- Internacia Solidareco", unukolora, 10 eŭroj por unu, 70 por 10, kaj "Vivu Che-metodo", dukolora, 12 eŭroj unope, 90 por 10.

Lasta pretigataĵo estas tri malsamaj, glumarkoj, en formato 7,5x4,5 cm kun jenaj teksoj: Esperanto-Internacia Lingvo, Per Esperanto por Anarkiismo, Per Esperanto por Komunismo. Prezoj: 10 el la sama speco por 1 eŭro, 100 por 7 eŭroj. Antaŭmendojn eblas jam direkti al Vinko Markov (adreso p78).